

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 553 (12) Dec. 1951



(Foto : O. Bünemann)

Je la ekskurso al Meissen (Dresden U.K. 1908)
*De maldekstre : D-ro Eduard Mybs,
D-ro kaj S-ino Zamenhof*

44a Jaro

Decembro 1951

N-ro 553 (12)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
 Palais Wilson, Genève, Svis.
 Urgajn informojn sendu rekte
 al Rickmansworth

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono (1952) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paço £6	$\frac{1}{2}$ paço £3
$\frac{1}{4}$ paço 30 sêl.	$\frac{1}{8}$ paço 15 sêl.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duoj da vortoj

Legantoj en 74 landoj

Eldon **numero 6000**



Enhavo

Indekso por *Esperanto* 1951

Specialaj artikoloj :

ialaj artikoloj :	paĝo
La 15-a de decembro : <i>H.J.</i>	289
Omaĝo pere de la veteranoj : <i>Carl Barthel, Oscar Bünemann, Margrethe Noll, Paul Nylén, Edmond Privat, R. Sakowicz</i>	293
Veterana Esperantista Klubo : <i>M. Lewin</i>	299
Tropika Fulmotondro : <i>Erika Linz</i>	303
Jura Signifo de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj : <i>D-ro I. Lapenna</i>	305
Hans Jakob 60-jarulo : <i>E. Malmgren</i>	309
En Stockholmo : <i>D-ro P. Kempeneers</i>	316

la 37-a Universala Kongreso de Esperanto ..	..	308
---	----	-----

Poemo : Aŭtuna Grimaco :	<i>Julio Baghy</i>	..	290
---------------------------------	--------------------	----	-----

Konstantaj Rubrikoj :

Enigmo Konkurso N-ro 63	..	..	..	..	..	310
Esperantista Vivo	..	..	..	..	..	309
Felietono "La Alaska Stafeto" : <i>F. Omelka</i>	..	..	..	..	..	311
Internacia Konkurso 1951	..	..	..	..	..	292
Niaj Kunlaborantoj : Oscar Bünemann, Germanujo	..	..	..	..	..	302
Oficiala Informilo	..	..	..	..	..	315
Radio kaj Esperanto	..	..	..	..	..	314
Tra la Libraro	..	..	..	..	..	300
Tra la Mondo Esperantista	..	..	..	..	..	291

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 553 (12)

Decembro 1951



La 15-a de decembro

tago de bilanco kaj de pripenso

CIU movado honoras la homon kiu ĝin iniciatis kaj la pionirojn kiuj sin donis por disvastigi la ideon. Por ni Esperantistoj, la memoro je la kreinto de nia lingvo estas memkomprenebla. Neniel arogante al ni la karakteron de ia religio, ni tamen **ne** povas forigi la alte moralan valoron de la internacia lingvo. Tiun ĉi tujan animan kontakton, kiun peras la scio de Esperanto, neniu alia kreaĵo konkurenca posedis kaj posedos, kaj tiu ĉi konstato farita de eksteruloj formas en si mem gravan aktivaĵon. Ni nomis tion *interna ideo*, difino sentimenta, sekve ne preciza. Por ni sufiĉas, ke ĝi ekzistas. Ĝi **ne** sufiĉas por forigi la daŭran konflikton inter-homan kaj eĉ inter ni mem, sed ĝi povas ĝin kanalogi kaj mildigi. La lingvo internacia, kiu devus laŭ simpla opinio servi la pacon, povas same servi la militon. Necesas tion diri! Ja ĉiu homa kreaĵo por la bono de l'homaro, same servis por la kontraŭo. D-ro Zamenhof sin inspiris de homamaj ideoj eternaj. Li sciis doni al tiu ĉi konstruaĵo de nova pli bona mondo, angulŝtonon **ne** forigeblan. Tion ni havu antaŭ niaj okuloj kiam apostoloj de alia solvo de

malnova problemo brue proklamas ion novan—sed kio ne estas nova.

La 15-a de decembro estas proksime je la jarfino kiam oni faras bilancon pri la agado. Ne temas nun pri materia bilanco, sed pri morala. Por nia movado la jaro 1951 finiĝas kun aktiva saldo, spite aron da amortizoj de valoraj bonhavoĵoj. La **aktiva saldo** estas la ĝojiga firmiĝo de nia movado, la videbla interesiĝo de novaj estroj en la kultura kaj politika vivo. Esperanto ne pereis, ĝi reprenas sian lokon. La amortizoj de valoraj bonhavoĵoj estas la malapero de la landoj orienteŭropaj el niaj libroj (tiufoje kontlibro kaj jarlibro!). Doloriga sed nur dumtempa. La movado floras en Ĉeĥoslovakujo, dume en aliaj ĝi vegetas. La apostoloj de nova solvo de la demando de internacia lingvo agitas. Ni estu klaraj. Ne estas io nova, kion oni proponas, estas la malnova imperialismo sur lingva tereno. En Oriento de Eŭropo, la rusa lingvo devos esti la solvo, subtenata de la potenca argumento, nombro kaj povo. Ie en Oriento oni eĉ malpermesas la lernadon de *kapitalistaj lingvoj* (legu: anglan kaj francan), la Ministro Grotewohl

proklamis, ke la rusa lingvo estos la peradlingvo.

En la okcidentaj landoj oni propagandas nun la ideon de “bilingvismo” precize, de *dulingveco* internacia. Tio estas, ke la angla kaj franca lingvoj estu la solaj esprimiloj en la internaciaj rilatoj. Se la afero en si mem ne estus tiom grava, oni devus ridi, sed oni inklinas plori. Kion oni proklamas en ambaŭ partoj de nia mondo estas nenio alia ol pura imperialismo, kiun ni Esperantistoj kontraŭbatalas ne per kanonoj sed per la simpla montro de pruvoj : jen ekzistas lingvo taŭga, funkcia kaj vivanta. Al la estroj de la nuna mondo ni povas diri “Donu nur eron de la energio kiun vi uzas por milito (aŭ kiel oni emas diri ‘por konservi la pacon’ !) kaj esploru tiun ĉi problemon de internacia lingvo ; vi farus pli multe por la paco ol reveni je io, kio ĉiam fiaskis.”

La vojo al sukceso estas longa kaj ŝtonkovrita. Same kiel Romo ne konstruiĝis je unu tago (urbo Romo kaj Roma Imperio) same ĉiu ideo opozicia al akceptitaj opinioj, vivantaj nur dank’ al la inerteco homa, ankaŭ Esperanto ne konkeros la publikan opinion dum kelkdeko da jaroj. Se nur unu el la kontraŭargumentoj de niaj malamikoj pravus, ne ekzistus plu nia movado kaj Esperanto ripozus en la Enciklopedioj kaj Leksikonoj kun deklinia teksto.

Tion ni prezentu al ni je la 15a de decembro kaj ni admiru la grandegan paciencon de D-ro Zamenhof, kiu, sen mona subteno, malriĉa kuracisto komencinta karieron, pripensis kaj agis.

Nin gvidu lia spirito, lia pacienco estu por ni ekzemplo.

H.J.

Julio Baghy :

Aŭtuna grimaco

*Ankaŭ mi estis foje feliĉa,
tero kaj vivo ŝajnis ĉielo,
havis mi sunon, lunon kun steloj,
floroj de revoj faris min riĉa,
ardis en mi ebrie sentbruloj,
nutris la koron suk’ de ĝojfonto,
perlon kaj oron kaŝis terbuloj,
bela, tre bela estis la mondo
Kiel belega estis ci, mondo !*

*Vivo mortvundis fidon, fidelon
kaj el ĉiel’ infero tuj ekestis,
suno kaj lun’ funebre sin vestis,
nuboj ombrumis stelojn kaj helon,
falas sur florojn ros’ de doloro,
tute sekiĝis suk’ de ĝojfonto,
koto pruviĝis perlo kaj oro,
monstre malbela iĝis la mondo . . .
Kiel malbela iĝis ci, mondo !*

*Masko de rid’ nun falsas mienon ;
ne plu de sort’ mi bonon atendas,
vanon, celperdon plore mi plendas :
kial plu porti tedon kaj splenon ? !
Ŝparas la viv’ pri ŝanco kaj ŝanĝo . . .
Montro de lang’ do estu respondo,
kiam mi mute pendos sur branĉo :
aĉa kaj fia estas la mondo . . .
Kiel fiiĝis aĉe ci, mondo !*



Tra la Mondo Esperantista



Argentino

Kurso en Buenos Aires. Longdaŭra prov-kurso (6 horojn !) gvidita de S-ro Miyachi kaj de Prof. Georgo Hess ĉe la Japana Asocio rezultigis bonan kurson ĉe la Esperanto-Asocio en Buenos Aires. Notinde estas, ke inter la partoprenantoj (japanaj kaj ne-japanaj) estis studentoj, laboristoj, pentristoj, muzikistoj, skulptistoj kaj instruistoj. Jam la novbakitaj samideanoj partoprenas la movadon.

Generala progreso. La movado nun antaŭeniras malgraŭ la multaj malfacilaĵoj pro la internacia kaj nacia politika situacioj, sed feliĉe ĝi nun posedas du valorajn kaj gravajn ilojn por sia agado ; La Praktika Kurso de Szilágyi (eld. de E.P.C. en Anglujo) kaj la nova Vortaro Esperanto-Hispana (eld. de F.E.B. en Brazilo—vidu p. 301). Antaŭnelonge raportistoj de la grava revuo *Mundo Argentino* publikigis ilustritan intervjuon pri la Esperanto-kurso.

Aŭstrujo

Zamenhof-Monumento estos starigita en la plej juna urbo de Aŭstrujo, Wörgl. La buston skulptos tirola samideano-skulptisto. La inaŭguro okazos somere 1952 kaj oni deziras ke Esperanto-lernanto (knabo aŭ knabino) deklamu poemon taŭgan por la solenaĵo. Oni petas ke poetoj senkoste verku tiajn poemojn (ne tro longajn). La tri plej belaj alsenditaj poemoj estas premiotaj (lasta alsendodato 31.3.1952) kaj la plej bela estas deklamota okaze de la inaŭguro.

(Adreso : S-ro Hans Steiner, Augasse 42, Wörgl, Tirol, Aŭstrujo.)

Brazilo

Radio. La nova direktoro de la Rádio Ministério da Educação e Saude, D-ro Carlos Rizzini, decidis starigi novan kurson de Esperanton en la kadro de la Colégio do Ar de ĉi tiu radiostacio. Gvidas la kurson nia samideano Nelson Pereira de Sousa (vidu p. 314).

Danlando

Junulgastejoj. La gazeto Dansk Vandrelaug, organo de la dana junulgasteja movado, kun eldonkvanto de 60.000 ĉiumonate, daŭre donas lecionojn pri Esperanto, sub la lerta gvidado de S-ro Otto Jensen.

Germanujo

Ekspozicio en Bonn okazis de la 6-a ĝis la 13-a de oktobro en la popolaltlernejo. Ĝi estas bone vizitita kaj favore raportita en la loka gazetaro. Rezultiĝis nova kurso.

Trafikoficejo Bonn. La direktoro ricevis dum la pasinta somero pli ol 200 esperantlingvaj skribaĵojn el eksterlando kaj pro tio promesis anstataŭi la Esperantlingvan aldonon al la faldprospekto pri Bonn per speciala Esperantlingva faldprospekto.

Gvatemalo

Ekspozicio de infandeseĝnaĵoj okazos en Marto 1952. Bonvolu atenti la reklamon sur paĝo 292 kaj helpu la tieajn samideanojn.

Hispanujo

Barcelona. Nun okazas tie tri kursoj ĉe la Esperanto-Grupo de la Kooperativo T.M. En aliaj urboj ankaŭ la movado plivigliĝas.

Italujo

Foiro de Padova. Oni anoncas ke ĝi pretigos siajn prospektojn ankaŭ en Esperanto kune kun la kvar aliaj lingvoj. Ŝajne tio estas la rezulto de bona impresado pri la utilo de Esperanto ricevita de la Foirestraro en la nuna jaro. (La Foiro reklamis en la Junia numero de *Esperanto*.)

Nederlando

Porinstruista seminario. En Oktobro komenciĝis Esperanto-kursoj

ĉe la ŝtata porinstruista seminario en Hilversum. La kursojn (en la ordinariaj lernejoj) partoprenas 63 gelernantoj.

Nov-Zelando

Tauranga. En Septembro la klubo festis sian datrevenon, kiu estas aparte raportinda ĉar la regiona radio-stacio 1 Y.Z. elsendis informon pri la historio de la klubo.

Sarlando

5-lingva koncerto okazis je 13 nov. en Saarbrücken. S-ro C. A. Kohler el München kantis germane, france, itale, angle kaj Esperante. La ĵurnaloj tre favore raportis.

Usono

Esperanta aŭtoro James D. Sayers informas nin ke *Invito al Ĉielo* baldaŭ aperos en la Finna lingvo (el la Esperanta originalo tradukita de J. N. Mikkola) ĉe la eldonejo Kuva ja Sana, Helsinki, Finnlando. Gratulon !

Internacia Konkurso 1951

Stato je la 31 de Oktobro 1951

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Maroko ..	400	650	162.5
2.	Portugalujo ..	600	935	155.8
3.	Brazilo ..	2500	3857	154.3
4.	Sud-Afriko ..	250	340	136.0
5.	Germanujo ..	2400	3220	134.2
6.	Finnlando ..	2000	2665	133.2
7.	Italujo ..	1700	2225	130.9
8.	Svislando ..	1400	1805	128.9
9.	Izraelo ..	300	360	120.0
10.	Japanujo ..	800	925	115.6
11.	Belgujo ..	2100	2414	114.9
12.	Norvegujo ..	1400	1569	112.1
13.	Urugvajo ..	250	265	106.0
14.	Britujo ..	12000	12654	105.4
15.	Hispanujo ..	1100	1125	102.3
16.	Islando ..	500	510	102.0
17.	Svedlando ..	5300	5266	99.3
18.	Nederlando ..	5000	4893	97.8
19.	Francujo ..	5700	5534	97.1
20.	Danlando ..	2800	2675	95.4
21.	Kanado ..	250	230	92.0
22.	Aŭstralio ..	900	820	91.1
23.	Nov-Zelando ..	800	710	88.7
24.	Usono ..	3000	2516	83.8
25.	Argentino ..	800	640	80.0
26.	Aŭstrujo ..	1000	782	78.2
27.	Irlando ..	250	195	78.0
28.	Kuĉo ..	250	145	58.0

GRAVA AFERO

Por faciligi la diskonigadon de la esperantista movado en Mezameriko, la esperantistoj de Gvatemalo aranĝos en Marto 1952, internacian ekspozicion de infandesegnaĵoj sub la patronado de la Departemento de Belartoj de la Registaro.

Ĉiuj samideanoj estas petataj helpi al la sukceso de la entrepreno, sendante dekon da desegnaĵoj sub la temo: Kiel la infanoj vidas sian regionon?

Sur ĉiu desegnaĵo indiku: nomaron, adreson, aĝon, lernejan jaron, lernejon.

La sendaĵoj estos reciprokotaj per gvatemalaj infandesegnaĵoj, poŝtmarkoj aŭ kafo, laŭ deziro.

Sendu al: Exposición de Dibujos—Departamento de Bellas Artes—Callejón Manchen—Gvatemala-Cd.—America Central.

Ili renkontis la Majstron !

Omaĝo pere de la veteranoj

Kompare malmultaj nun estas la gesamideanoj, kiuj persone kontaktis D-ro L. L. Zamenhof, kaj ankoraŭ pli maloftaj estas la homoj, kies rilatoj kun la Majstro estis io pli ol nura konvencia saluto. En ĉi tiu numero de nia revuo, tradicie dediĉata al la memoro de la iniciatinto de Esperanto, ni prezentas kelkajn personajn impresojn aŭ anekdotojn pri renkontiĝoj inter iuj niaj pioniroj kaj D-ro Zamenhof.—M.S.

LERNINTE sufiĉe Esperanton, aŭtune de 1892 mi turnis min al D-ro Zamenhof por aboni lian gazeton "Esperantisto," kiu estis presata en la germana urbo Nurnbergo. Li tuj respondis per poŝtkarto, mia unua skribaĵo de li, sed ne la lasta. Enskribinte min, en septembro 1893, en la universitato de Upsala, mi aliĝis al la juna klubo esperantista tie. Tiu havis viglajn rilatojn kun la Doktoro, sia honora membro.

En 1895 la klubo decidis eldoni novan svedan lernolibron de Esperanto kaj komisiis al mi verki ĝin. Pro tio mi korespondis kun Zamenhof, petante permeson ĉerpi el liaj tekstoj. Li respondis, ke mi povu kiom ajn uzi laŭ mia bontrovo. Poste mi ankaŭ faris por la klubo vortaron esperanto-svedan. Tiam mi letere demandis lin pri la ĝusta signifo de multaj vortoj, kiujn li klarigis, ĉiam tre koncize kaj trafe.


En tiu sama printempo la unua katastrofo frapis la junan Esperantomovadon: la rusa cenzuro malpermesis la gazeton! Ĉar du trionoj de la tuta abonantaro de la "Esperantisto" troviĝis en Ruslando, la gazeto devis ĉesi. La prezidanto de la klubo Upsala, V. Langlet, somere vojaĝis en Rusujo kaj vizitis tie siajn esperantistajn korespondantojn. Unu rezulto de interkonsento kun la rusaj amikoj estis la fondo de

nova gazeto anstataŭ la mortigita, nome "Lingvo Internacia", eldonita de la Klubo Esperantista en Upsala. La unua "prova" numero aperis en decembro 1895.

Pro tiu rolo la Upsala klubo fariĝis la centro de la movado, kaj la jaroj 1896–1900 fakte estis la *Upsala periodo* de la Esperanta historio. Ĝis tiam Zamenhof mem gvidis la sorton de sia lingvo, nun li lasis al la junaj adeptoj en tiu sveda loko la redaktadon de la gazeto. La lingvo estis tute nova, ĝia literaturo malmulta, la vortaro kaj ĝiaj eblecoj estis ankoraŭ, en multaj rilatoj, neprovitaj. Kiel estrarano mi kunlaboris pri la gazeto, de en 1897 kiel ĉefa redaktoro. La korespondado kun preskaŭ la tuta mondo estis abunda. Kiam de Beaufront, kiu diligente verkis por la L.I., fondis en 1898 la francan societon kaj sian propran organon, li urĝe petis nian apogon kaj rekomendon por bona sukceso.

Kvankam D-ro Zamenhof nur escepte skribis por la L.I. ni havis tamen dum tiu tuta tempo kun li konstantajn rilatojn, i.a. ni mendis liajn verkojn kaj li regule ricevis niajn eldonaĵojn.

Persone mi renkontis la Majstron ĉe la U.K. en Bulonjo-sur-Mar. En ekskurso al banurbo Wimereux li iom promenis ĉe mia flanko intime interparolante, scivola pri la stato en mia lando. Ankaŭ ĉe la 2-a U.K. en



Ĝenevo kaj la 4-a en Dresden mi povis premi la manon de tiu neforgesebla viro.

Paul Nylén, Svedlando.

* * *

UNUAN fojon mi vizitis D-ro Zamenhof en Parizo, kie li haltis survoje al la Bulonja Kongreso en 1905. Li tiam loĝis ĉe blinda scienculo, D-ro Javal, amiko de generalo Sebert. Jam plurfoje mi estis ricevinta de nia Majstro tiajn varmigajn poŝtkartojn, kiajn li amike skribis al junaj batalantoj por la afero. Nura knabo mi estis tiam, en meza klaso de gimnazio, sed du jarojn antaŭe estis fondinta kun Hector Hodler la gazeton "Juna Esperantisto" en Ĝenevo kaj D-ro Zamenhof tre ĝentile kuraĝigis nin.

Imagu la impreson de kvazaŭ infano faranta la unuan viziton eksterlanden kaj konsideranta la viziton al D-ro Zamenhof kiel centoble pli gravan ol tuta Parizo kun ĝia belega Placo de la Konkordo kaj ĝia kapturniga Eifel-turo. Ĵus oni legis en la matenaj gazetoj, ke la kreinto de Esperanto tagmanĝis sur tiu turo kun deko da scienculoj, membroj de la diversaj Akademioj.

Lia bonkora persono, tiuj rondaj okulvitroj, lia elparolo "dentolipa", lia modesta, eĉ timema, sinteno impresis min. En tiuj tagoj malĝojigis lin tiamaj disputoj inter parizaj esperantistoj kaj ia klopodo por ke li ne parolu publike pri sia

maldekstre

La partoprenantoj de la unua Esperanto-kongreso : 1905. Boulogne-sur-Mer, Francujo :

afable pruntita de Eldona Societo, Svedlando, el la libro

"50 Jarojn kun Paul Nylén".

homara idealo. Li klarigis al mi sian ĉagrenon. En la sama tempo kiam honoroj bonvenigis en la brila eŭropa ĉefurbo la humilan okuliston de malriĉaj varsoviaj, naŭza vermaĉo donis maldolĉan guston al la nova frukto ĉiama sperto de la vivo.

Kelkajn tagojn poste mi aŭdis lin malfermi la unuan kongreson kaj legi per mallaŭta, iom tremanta voĉo, sian noblan poemon: "Al vi, ho potenca senkorpa mistero, fontego de l'amo kaj vero . . ." Profunde mi sentis lian animon de profeto. Poste lia soifo al harmonio gvidis mian propran vivon.

Lastan fojon mi vizitis lin en Varsovio dum la unua mondmilito en 1916. Min entuziasmigis tiam la sopiro de subpremataj nacioj al libereco, pri kio mi verkis. Zamenhof estis jam tre malsana, sed li ankoraŭ esprimis fervore sian penson. Li avertis min kontraŭ iluzioj pri naciismo. Li pravis, ĉar, apenaŭ liberaj, la popoloj ekbatalas pri landlimoj aŭ rifuzas al aliaj gentoj tiujn rajtojn, kiujn ili postulis por si. Neniu harmonio de la homaro povas ekzisti sen liberiĝo de ĉiuj familianoj unuflanke kaj suverena mondunuigo aliflanke. Tiu ĉi lasta revo de Zamenhof nun fariĝas praktika celo. Por ĝin ebligi li donis flugilojn al Esperanto.

Edmond Privat, Svislando.

KIAM mi ricevis la proponon skribi miajn memoraĵojn pri D-ro L. Zamenhof, denove aperis en mia memoro maja mateno antaŭ pli ol kvardek jaroj, kiam en jaro 1910 mi, kiel juna studento kun grupo de aliaj Peterburgaj esperantistoj prepariĝis por renkonti nian Majstron alvenantan Peterburgon por partopreni en la unua tutruslanda Esperanto-kongreso.

Mi estis tiam preskaŭ sesjara esperantisto sed la unuan fojon en mia vivo mi havis la okazon ĉeesti kongreson kaj krom tio vidi, aŭdi kaj kunparoli la aŭtoron de la lingvo. Malgraŭ mia sufiĉe jam longa esperantista vivo mi estis tro juna por esti "eminentulo" kaj miaj rememoroj estas nur impresoj de junulo, kiu vivis "sub la sankta signo de l'espero".

La ĉefa gvidanto de la ruslanda esperantista movado estis en tiu tempo kozaka kapitano Aleksandro Postnikov, energia kaj ambicia prezidanto de la de li mem fondita Ruslanda Esperanto-Asocio. Li organizis tiun ĉi unuan kunvenon de ruslandaj esperantistoj kaj se oni atentigas la ne tro fortan situacion de la tiutempa movado, li organizis ĝin kun sufiĉa brilo. Jam ĉe la stacidomo mi kun certa estimo rimarkis elegantan duĉevalan kaleŝon, speciale dungitan por nia Majstro.

50 JAROJN KUN PAUL NYLÉN

63 paĝoj, 20 × 27 cm., kun centoj da bildoj,

eldonita de Eldona Societo, Stockholm; prezo 6ŝ. 3p., afranko 6p.

mendu ĉe :


U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo

Sur la perono kolektiĝis la plej konataj esperantistoj de la tiam ruslanda movado: s-ro Evstifejev, aŭtoro de kelkaj esperantaj lernolibroj kaj propagandaj broŝuroj; s-ro Devjatnin, konata esperanta poeto; s-ro V. Lojko, esperantisto de la dua generacio, sekretario de la freŝe mortinta fama societo "Espero", la unua oficiale registrita societo esperantista al kiu jam en 1892 Zamenhof sendis la unuan esperantlingvan telegramon: "Benitan komencon kreskantan potencon en floro kaj gloro deziras el koro Zamenhof." Tiun ĉi telegramon mi vidis en la arkivo de la societo "Espero".

Starante sur la perono mi modeste rigardis kiel la eminentuloj ĉirkaŭis la malaltan okulvitran homon en uzita tiam malmola ronda ĉapelo, kiu eliris el dua klaso de la rapida vagonaro. Tiun ĉi homon oni povis tuj ekkoni. Li estis tute simila al multaj fotografaĵoj aperantaj en esperantistaj gazetoj.

Komenciĝis ĝenerala prezentado: emociigita, unu el la lastaj, mi premis la manon de la Majstro, balbutante salutvortojn. Ĉiuj direktiĝis al la kaleŝo, kaj D-ro Zamenhof, akompanate de S-roj Postnikov, Evstifejev kaj Lojko, ekveturis. Mi havis honoran gardon, biciklante post la kaleŝo. Kondukinte la kaleŝon ĝis la fina celo mi rapidis prepariĝi por la malfermo de la kongreso.

Kiam venis D-ro Zamenhof kaj komencis sian paroladon (kiun vi povas tralegi en lia *Plena Verkaro*) mi ne tro atente aŭskultis la enhavon de la parolado, sed streĉe atentis la parolmanieron, la prononcadon de la aŭtoro de la lingvo. Mi memoras la malfermitan *o*, tute kontraŭan al la, ni diru, germana, gorga kaj ronda; *i* ne similan al la malmola okcidenta



*D-ro Zamenhof ĉe la 4-a U.K.
Antwerpen, Belgujo, 1911*

kaj eĉ pli firman ol la pola *y*; meze molan *l* tute malproksiman de la bulgara malmola sono de tiu ĉi litero.

Sed super ĉio estis la beleco kaj precizeco de la formo. Sonis la plej eleganta esperanta stilo, kiun mi aŭdis en mia vivo. D-ro Zamenhof estis eble la sola aŭtoro (el multaj aŭtoroj de universalaj lingvoj) kiu perfekte posedis la kreitan lingvon. Mi ne bezonas laŭdi la ĉarmon de la lingvo uzita de D-ro Zamenhof, sed mi volas substreki la senton de certeco, ke ĉiu vorto estas ĝuste uzita. D-ro Zamenhof estis vera majstro de sia lingvo.

Aliaj "materian" memoraĵon mi konservis dum longa tempo post la vizito: la cigaredo per kiu D-ro Zamenhof regalis min!

Sed nun, grizhara, maljunulo, mi bedaŭras, ke mi ne vokis tiam, kiel iu granda poeto: "Momento haltu, estas vi belega!"

R. Sakowicz.

MI vidis D-ron Zamenhof persone unue dum la Dresdena kongreso en la jaro 1908 (post tiu kongreso mia edzino lernis Esperanton ; sed tiam ni eĉ ne estis ankoraŭ gefianĉoj) kaj poste mi kune kun mia edzino vidis lin kaj lian edzinon en Hamburgo, kiam ili revenis tra Hamburgo de la Vaŝingtona kongreso en 1910. Mi memoras nur, ke ni havis plej agrablan impreson pri la geedzoj Zamenhof kaj estis tre kontentaj pri la interkonatiĝo.

Dum la Nurnberga kongreso en 1923 mia edzino kaj mi ofte babilis kun s-ino Zamenhof kaj konstatis, ke ŝi estas vera esperantistino en la interna senco de tiu vorto. Ŝi absolute identiĝis kun la sentoj kaj ideoj de sia edzo, kaj estis por ni ambaŭ vera ĝuo, iom intime konatiĝi kaj paroli kun ŝi.

Kiam mi ĉeestis la Dresdenan kongreson, mi estis 23-jara, kaj mi estis tute ekstaza post la parolado de Zamenhof kaj la komuna kantado de la himno. Estis vere grandioza travivaĵo !

En tiu tempo estis la atako de la idistoj, kaj unu el la ĉefaj kongreskantoj estis "Ni restu fidelaj" laŭ la konata melodio *Adeste fidelis*. Mi memoras, ke Kolonelo Pollen iris entuziasme al la podio kaj laŭte vokis en la grandan kongresan salonon, "Ni restas fajdejaj ! (fidelaj)". Mi spertis, ke en la postaj jaroj ĝenerale la prononcado forte pliboniĝis. Ankaŭ Pollen, certe, poste prononcis pli korekte. Sed neniu kritikis lian prononcon ; ĉiuj kore aklamis lian diron kaj sentis fortan kortuŝon pro lia sincera voko kaj pro la simpatia persono.

Oscar Bünemann, Germanujo.

(Al S-ro Bünemann ni sincere dankas pro la prunto de la kovrilpaĝa foto.)

EN la jaro 1908 post la Dresdena kongreso ni Kopenhagaj novnaskitaj esperantistoj ekhavis la kuraĝon aranĝi tri postkongresajn tagojn en nia urbo kaj ni invitis D-ron Zamenhof. Li unue rifuzis ĉar pro malbona koro li timis la longan marvojaĝon. Ni trankviligis lin rilate al la maro kaj fine lia bona koro venkis. Li venis.

Dum festvespero en Tivoli mi havis la grandan honoron sidi ĉetable flanke de D-ro Zamenhof. Tio estis la plej granda momento en mia vivo, ke mi, apenaŭ unujara esperantisto, estis elektita por tiu granda honoro de mia instruisto. Mia koro forte batis, sed ĝi baldaŭ trankviliĝis pro lia tute natura kaj aminda tenado. Mi tuj rimarkis, ke D-ro Zamenhof diris "nian lingvon" sed ne "mian".

Dum la unua mondmilito mi estis peranto por D-ro Zamenhof kaj lia filino Sofia, kiu servis kiel militkuracisto ekster la okupita Polujo. Zamenhof sendis siajn leterojn al S-ro Georg Mahn en Breslaŭ kaj li sendis ilin al mi, kiu poste sendis ilin al la filino. Survoje al la kongreso en Parizo 1914 Zamenhof disiĝis de sia frato Felix kaj lia edzino, kiuj 4 semajnojn poste ankoraŭ ne venis hejmen, dum Zamenhof kaj lia edzino post streĉa vojaĝo tra Skandinavujo en la daŭro de 14 tagoj venis hejmen. Per adreso de iu sinjoro en Heidelberg mi sukcesis trovi Felix Zamenhof. Se mi ne erare memoras, li kuŝis en hospitalo pro rompita kruro, sed ankaŭ li revenis hejmen.

Mi havis la doloran taskon sciigi al D-ro Zamenhof la morton de lia amata frato Aleksandro, kiu subite mortis ekster la okupita Polujo, kaj same doloran taskon sciigi al Sofia Zamenhof la morton de ŝia patro.

Margrethe Noll.

K ORESPONDINTE jam en 1904 kun D-ro Zamenhof pri lia genia elpenŝaĵo, mi tre ĝojis renkonti lin dum la Bulonja kongreso en aŭgusto 1905.

Plurfoje mi estis akceptita de D-ro Zamenhof kaj lia ŝatinda edzino. La Majstro alvenis (al Frankfurt) en aŭg. 1906 kaj ni aranĝis grandan feston en la fama Palmĝardeno. Denove li venis kun sia edzino kaj laŭ mia rekomendo uzis la kuracadon en la fama banurbo Nauheim, ne tre malproksime de Frankfurt. La 17-an de sept. 1950 ni fiksas memortabulon je la domo, kie la geedzoj Zamenhof

loĝis en Bad Nauheim en 1907, kaj kunvenis en la sama restoracio kiel en 1907.

Zamenhof estis tre bonkora, ekstere iomete timema homo, kun mallaŭta voĉo kaj mildaj okuloj. Bedaŭrinde mi ne plu renkontis nian tiel modestan kaj samtempe spiritan heroon, kiu oferis sian vivon por feliĉigi la homaron.

Por mi, kiel maljunulo, Zamenhof ĉiam restos la simbolo de vera homarano, kiu laboris nur por la estonteco kaj por la bono de la tuta homaro.

Carl Barthel, Germanujo.



*Ges. Zamenhof ĉe Frankfurt, Germanujo, je 15 februaro 1907.
Apud la Majstro S-ro Carl Barthel.*

daŭrigo (de p. 299)

Tiu regularo estas pridiskutota kaj fine aprobota de la kunveno en Oslo, sed intertempe mi bonvenigos kritikojn aŭ novajn proponojn per leteroj al mia adreso (respondkuponoj petataj). Ankaŭ modifoj al la listo estos danke akceptotaj. *M. Lewin, 33 Kingscroft Avenue, Dunstable (Beds.), Anglujo.*

Notu : mia ĝisnuna listo enhavas 23 jubileanojn de antaŭ 1902, kaj 115 veteranojn de antaŭ 1910.


Veterana Esperantista Klubo

EN la du kunvenoj de Veteranoj, kiuj okazis dum la Kongresoj de 1949 kaj 1950 oni esprimis ĝeneralan deziron, ke tiaj kunvenoj fariĝu regula ero dum la venontaj Universalaj Kongresoj. Sekve de la publikigo de la unua nekompleta listo de nomoj en la ĉi-jara Julia numero de *Esperanto* mi ricevis pli ol 50 alskribojn el diversaj landoj kun peto aldoni novajn nomojn al la listo, kaj jen la **aldona** listo :

- | | | |
|---|---------------------|--------------------|
| 1892 : G. Maillard ; | 1898 : R. Vincent ; | 1899 : G. Marin ; |
| 1900 : A. Ploussu ; | 1901 : R. Bagnulo ; | 1902 : C. Brunet ; |
| 1903 : H. T. Bailey, G. D. Lewis, A. H. Marich, F-ino A. Schaefer, S. Whitaker ; | | |
| 1904 : F. W. Hipsley, H. Salokannel ; | | |
| 1905 : I. Alvarez, G. Biancini, P. J. Cameron, S. La Colla, G. E. Dell, H. B. Eldon, F-ino L. S. Grant, C. Grazzini, Hartley, A. Humez, B. Long, C. Nix, J. O. Naalsund, Edmond Privat, J. A. Peart, P. Schacht ; | | |
| 1906 : C. Barthel, P. M. Elworthy, P. Hübner, P. Lendorff, G. Melo, Nickolls, W. Rogler, P. Rian, R. Rian, Serard, G. T. Woolfenden ; | | |
| 1907 : J. Alker, Degon, C. Engesgaar, Hurley, O. B. Sletterod, J. Swalf, J. P. Nix, C. W. Veness ; | | |
| 1908 : Ashworth, J. Berger, Brierley, A. Christensen, A. R. Horsley, G. Knopf, R. Maraury ; | | |
| 1909 : S-ino Bramkampf-Weber, A. Camuffo, A. Halbedl, M. W. Gee, O. Nanni ; | | |
| 1910 : J. Course, V. V. Sumfield, J. Schumm. | | |
| 1911 : H. Steiner, F. Kreutzberg. | | |

Bedaŭrinde pro manko de organizanto ne okazis kunveno ĉe la nunjara Munkena Kongreso, sed oni esperas ke unu okazos en Oslo. Sed la plejmulto de miaj korespondintoj entuziasme sugestas, ke oni starigu konstantan organizaĵon de veteranoj, kaj pro tio mi proponas krei tutmondan klubon, kun la jena regularo :

1. Nomo—Veterana Esperantista Klubo (V.E.K.O.)
2. Ĉiu Esperantisto post 40-jara scio de la lingvo estas Veterano, post 50-jara Jubileano, la plej malnova titoliĝas Dojeno.
3. Veteranoj fariĝas membroj de la Klubo sciiginte al la honora sekretario sian nomon, titolon, adreson, naskiĝdaton kaj Esperantistiĝ-jaron.
4. Klubanoj pagas nenian kotizon. Ili rajtas porti specialan insignon, kaj titoliĝi (neoficiale) VEKano.
5. Ĉe ĉiu Kongreso okazas jarkunveno. Prezidas la plej malnova membro. La Prezidanto laŭtlegas la alskribon de la Dojeno, instalas la novveteraniĝantojn, kaj prezentas al ili la insignon. Oni komune fotografiĝas, mansubskribas, tostas, kantas veteranan himnon k.t.p.
6. Forestintaj VEKanoj povas perpoŝte mendi la insignon de la Sekretario.
7. Post ĉiu kongreso la Sekretario publikigas ĝisdatan liston de VEKanoj.
8. La Dojeno, la Prezidinto, kaj la elektita Sekretario gvidas la klubon dum la inter-kongresa periodo.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

***Papo Pio X. Beata** de D-ro Adolf Halbedl. Eld. A. Paolet, Italujo. 19×13cm. 107 p. kaj 9 bildoj, prezo broŝ. 6ŝ. 6p., afranko 3p.

Biografio pri viro, kiu pro siaj eksterordinaraj kapablecoj atingis la plej altan oficon de la katolika eklezio, kvankam li nur estis la filo de malriĉa komunuma servisto, estas leginda kaj interesplena ankaŭ por nekatoliko. Pio X-a estis papo kun novaj kaj ofte revoluciaj ideoj, li ankaŭ antaŭvidis evoluojn, pri kiuj la samtempuloj ne pensis. La Esperantistoj ŝuldas al li specialan dankon, ĉar li dum tempo—estis jam en la jaro 1906!—estis por Esperanto, kiam multaj “seriozuloj” Esperanton ankoraŭ rigardis kiel fantaziaĵo. La papo kuraĝis diri: “*Esperanto havas grandan estontecon!*” Li ankaŭ sendis afablan leteron al la eldonisto kaj al la kunlaborantoj de la revuo *Espero Katolika*, kio estas dum la 2-a U.K. en Ĝenevo (1906) laŭtlegita kaj forte aplaŭdita.

La libro kelkfoje mencias la favoran sintenadon de la papo rilate al Esperanto. Estus dezirinde, ke oni ĉe noveldono de la libro dediĉu specialan ĉapitron al tiu ĉi problemo, kiu estas tre interesplena kaj grava por la historio de Esperanto. Sed antaŭe estus necese zorgeme kolekti la necesajn dokumentojn el la gazetaro kaj el la arĥivo de la Vatikano. Ĉu eble povus plenumi tiun ĉi taskon la italaj gesamideanoj, kiuj prizorgis ankaŭ la bildojn por la libro?

Ludwig Thalmaier.

***La Nekonatino** : Reinhold Conrad Muschler. El la Germana lingvo tradukis Ludwig Goppel. Eld. Limburger Vereinsdruckerei, Limburg, Germanujo. 19.5×12.5cm. 66 p. prezo bind. 5ŝ. 6p., afranko 2p.

Ĉi tiu novelo estas simpla rakonto pri provinca junulino Franca, kiu fariginte senparenca aspiras Parizon. En Marsejlo ŝi hazarde renkontas Anglan lordon, kun kiu ŝi amikiĝas. Akompanata de li, post nereкта vojaĝo, ŝi atingas la ĉefurbon. Tie la geamikoj disiĝas: li iras al Egiptujo kaj la fianĉino; ŝi iras al la morto. La historieton la aŭtoro delikate rakontas, kaj en tio kuŝas la ĉarmo de verko, jam tradukita en plurajn lingvojn. La lingvo de la Esperanta traduko, aprobita de Lingva Sekcio de G.E.A., estas elstare bona. Nur tie kaj tie mi preferus alian formon: *de* anstataŭ *ek de*; *poste* anstataŭ *pli poste*; *de la* anstataŭ *de l’*. Cetere mi opinias konsilinde en tia verko listigi radikojn netroveblajn en P.V. (Mi notis *frikas*, *humid*, *budit*, *glugl*).

Mi esperas, ke ĉi tiu iom maldika, tamen bone presita, volumo estas signo, ke el Germanujo denove venos verkoj de lingva kaj literatura merito. Almenaŭ la eldonantoj anoncas, ke aliaj verkoj sekvos.

C. D. A. Capp.

**Pagu vian kotizon por 1952
senprokraste—se vi ankoraŭ ne
faris tion!**

***Diccionario Esperanto-Español:** Enrique Balech kaj Manuel Fernández Menéndez. Eld. Federação E. Brasileira, Rio de Janeiro, 18.5 × 12.5 cm. 122 paĝoj, prezo broŝ. 4\$, afranko 3p.

Al la regaloj por lingvo- kaj libro-amantoj, kiuj estas la eldonoj de brazilaj samideanoj, nun alviciĝas nova libro, kiu certe estas utila al nia movado. Temas pri vortaro esperanta-hispana (pli ĝuste glosaro, ĉar apenaŭ troviĝas klarigaj ekzemploj pri vortuzoj), kiun komencis s-ro Fernández Menéndez (Urugvajo), daŭrigis kaj kompletigis s-ro Balech (Argentino) kaj eldonis la Federação E. Brasileira, danke al la mentoreco kaj helpemo de s-ro I. Gomes Braga (Brazilo), en feliĉa samideana kunjungo trinacia. Cetere ĝi estas la unua tia vortaro eldonita en Ameriko.

Kvankam la aŭtoroj estas kompetentaj kaj bone profitis antaŭajn laborojn, ĉefe—kaj prave!—*Plenan Vortaron* de SAT, kiujn ili sekvas eĉ en ĉi ties eraroj (ekz. *afido* ĉe P.V. devas esti *afiso* : nu, la recenzata verko ree presis *afido*'n); kvankam ili havis plentaŭgan materialon en pluraj vortaroj de hispanoj (kelkajn el kiuj ili citas en la antaŭparolo); tamen ili ne ĉiam agis konsekvence nek interkonforme eluzis la akumulitan sperton, kaj sekve ilia laboro ne estas ĉiel senriproĉa. Sed la aŭtoroj ne ignoris tion, kaj lojale agnoskas tiun staton la enkondukaj alineoj.

Preseraroj tre oftas, ĉu rilate esperantajn ĉu koncerne hispanajn vortojn. Eĉ hispana ortografio, ĉefe pri akcentaj superstreketoj, estas nek tute konsekvenca nek plene ortodoksa.

Kaj, malgraŭe, la verko estas grava, laŭdinda, kaj prezentas notendan

laboron, eĉ se kelkrilate kaj plurloke plibonigeblan. Estus dezirinda baldaŭa dua eldono—grava vortaro vere bonas nur ekde la dua aŭ tria re-ellaborita eldono!—al kiu kontribuos hispana spertulo; en Hispanujo ja konserviĝas pli neta la etoso de la hispana lingvo, ĉar en Ameriko, kompreneble, multloke signifoj kaj ĉefe nuancoj malsamas aŭ rimarkinde diverĝas.

Tial la tri kunpatrigintojn de la libro ĉiuj hispanparolantoj povas kaj devas ŝatdanki, ĉar ili plurdirekte eminente kvazaŭpioniris interkorespondon de esperantaj kaj hispanaj sencoj sur la malfacilega, ĉie embuska, forte laciga, ĉiam maldanka agro leksikona.

J. Régulo Pérez.

Ricevitaj :

(petante, skribu nur Esperante)

Itala Turisma Klubo : Esperantlingva faldfolio enhavanta informon pri tio, kion I.T.K. disponigas al interesuloj en la kampoj de turista literaturo kaj kartografio pri Italujo. Petu de : Touring Club Italiano, Corso Italia 10, MILANO, Italujo.

Como (Italujo) : plurkolora, bele ilustrita, gvidfolio pri la lago de Como (kun landkarto) kaj 16-paĝa gvidlibro pri la lago kaj la ĉefaj turismaj lokoj ĉe ĝi. Petu de : Ente Provinciale per il Turismo, Como, Italujo.

LA MANGADO KAJ LA SANO

En tiu artikolo de J. W. Leslie sur paĝo 273 de la Novembra *Esperanto* lastmomente enŝteliĝis iom grava eraro. Por korekti tion oni tute ellasu de p. 273 (1-a kolono) "**Sukeroj** . . ." ĝis p. 273 (2-a kolono) ". . . ne boligu ĝin."

Al s-ro Leslie kaj al niaj legantoj ni pardonpetas pro la fuŝaĵo.

Dankon : Ni deziras esprimi nian koran dankon al S-ro T. K. Slade pro kunlaboro ĉe kompilo de la Indekso.

Niaj Kunlaborantoj

**Oscar Bünemann, Honora Membro de U.E.A.,
Ĉefdelegito en Germanujo**

INVITI Oscar Bünemann esti Ĉefdelegito de U.E.A. tuj post la dua mondmilito estis feliĉa decido. En tiuj maltrankvilaj tagoj, plenaj je malfido, suspekto, eĉ malamo, inter la germanaj Esperantistoj elstaris la persono de Oscar Bünemann, kiel lumturo de absolutaj honesto kaj fidindeco. Lia posta laboro tute pravigis la decidon elekti lin oficiala reprezentanto de U.E.A. sur la germana teritorio, ĉar en ĉio kion li faras montriĝas konscienca detalemo kaj zorgo por la bona ordo.

Fariĝinte adepto de Esperanto jam en 1905—post legado de raporto en *Echo de Paris* pri la unua kongreso en Bulonjo-sur-Mar—li estas unu el niaj pioniroj. En la daŭro de la jaroj li okupis multajn oficojn en la movado, kaj al ĉiu posteno li portis entuziasmon kaj fervoron por la idealismo de la afero. En 1908 li aliĝis al U.E.A. kaj ricevis numeron 199. En 1910 li fariĝis ano de la Lingva Komitato kaj nun estas Akademiano. Aktiva ano de la Vegetara Ligo Esperantista, li fondis en 1914 ĝian organon *Vegetarano*, kiun li redaktis dum multaj jaroj. En la Hamburga Socialista Esperanto-Organizo li estis de la komenco redaktanto de *Antaŭen*. De lia plumo venis konstanta fluo de artikoloj, tradukoj de poemoj k.s., kaj la Esperantistaro ŝuldas al li la tradukon de *Reaperantoj* de Henrik Ibsen. En ĉio li defendis la unuecon kaj ĝustecon de la lingvouzo kaj mem estis modelo sekvida.



Krom la laboroj spècife Esperantismaj, S-ro Bünemann estas ĉiam aktiva sur la tereno de pacifismo, lingvoj, socialismo, kaj etikaj aferoj, kaj estas sensalajra malriĉulfleganto kaj sensalajra laika asesoro en la Hamburga Administracia Tribunallo.

Dum preskaŭ sia tuta Esperantista vivo nia kolego ĝuas la kunhelpon de fidela apoganto de nia afero. Jam de 1908 S-ino Bünemann estas fervora apostolo de la interna ideo de la Esperantismo. La sindonemo kaj altanimeco, kiuj karakterizas niajn du germanajn amikojn, estas inspiro por ĉiuj kiuj konas ilin, devigantaj al sinceraj respekto kaj admiro; kaj ne estas troigo diri, ke inter vasta rondo direktiĝas al Gesinjoroj Bünemann sento de vera amo. Ke ili restu longe inter ni, donante al la novaj generacioj de samideanoj ekzemplon kaj modelon!

M.S.

Erika Linz :

Tropika Fulmotondro

“**C**U vi vere iros hodiaŭ al Caraguatatuba?” demandis mia edzo, kiam mi pretigis min longe antaŭ la sunleviĝo por foriri. “Ĉu vi ne aŭdis hieraŭ la aluatojn?” La kabokloj (indiĝena gento) diras, ke la aluatoj kriegas sole antaŭ pluvo. Mi tamen jam plurfoje konstatis, ke ne pluvis post kiam ili estis kriegintaj, kaj antaŭ ĉio mi sopiris, sopiregis ricevi la leterojn, kiuj certe jam atendas min en la poŝtoficejo. Mi do iris.

Post rapida marŝo mi atingis la arbarvojeton. Jam dum kelka tempo mi vidis malhelan nubon rampantan de la horizonto trans la ĉielon, malfeliĉe ĉe la flanko de kiu preskaŭ ĉiam la vento blovas al ni. Unue mi esperis, ke mi atingos ŝirmon antaŭ ol ĝi alvenos kun sia pluvo, sed mi baldaŭ vidis, ke tio certe ne estos ebla. Kion fari? Ĉu mi reiru kelkajn kilometrojn al la vendejo? Ne, antaŭen! Se mi kuros laŭ la arbarvojeta mi povos resti dum la pluvo en *nia rifuĝejo*. Tio estis grandega arbo kun kavaĵo en la trunko.

La tuta ĉielo jam malheliĝis. Mi kuras, vere kuregas laŭ la arbarvojeta plena je malhelpaĵoj, kaj atentis nek radikojn nek dornojn, kvankam mi estis nudpieda. Mi sole observis la lokojn, kien mi metos miajn piedojn, ĉiumomente preta per salto transsalti eventuale subite vidatan venenan serpenton. Supre jam grumblas. Antaŭen! Tropika fulmotondro komenciĝas multe pli subite ol fulmotondro en modera zono. La pluvo jam ektamburas sur la densan foliaron. Tuj ĝi trapenetros ĝin. Mi preskaŭ

flugas! Tie ja estas la oblikve staranta arbo. Nur ankoraŭ 20 metroj!

Mi ensaltas en la kavaĵon malsekega de ŝvito kaj kun laŭte sonanta spiro. Ne estas tro frue! La diluvo jam komenciĝas. Kvazaŭ longaj ŝnuroj la pluvo krakadas sur la teron. Fariĝas preskaŭ nokto-malhele. Ĉiumomente blankverda fulmo disŝiras la malhelon kaj la tondro nun ne ĉesas. Laŭ la arbarvojeta malsupren fluegas torento, kunportanta foliojn, branĉetojn, lignopecojn. Ĉe mi estas seke. Tion scias ankaŭ kelkaj vermoj, kaj insektoj, kiuj certe konis tiun rifuĝejon, kiel mi. La pluvo nun aspektas vera kurteno.

Fulmego kaj sammomenta tondrego pli laŭta ol mi iam ĝin aŭdis, kaj poste terura krakado de falantaj arboj. Fulmo certe trafis tre proksime de mi altan arbon, kiu kuntiris ankoraŭ aliajn. Mi cerbo tuj komencis labori. Kion fari se fulmo faligos mian gastiganton? Mia patro ĉiam instigis nin, ke ni bone imagu minacantan danĝeron kaj antaŭpripensu, kion ni faru por eviti aŭ por venki ĝin. Dum danĝeraj ekskursoj sur rokoj kaj glacio en la Alpoj li ekzercadis tiamaniere mian cerbon. Per tio li atingis, ke tiu antaŭpensado fariĝis kutimo ĉe mi kaj ebligis al mi jam ofte savi al mi la vivon, kaj kelkfoje ankaŭ tiun de aliaj homoj.

Mi studas atente la suprojn de la apude starantaj arboj. Mia arbo certe falus laŭ tiu direkto. Do tien (laŭ la vojo malsupren) mi ne saltu! Tiun ĝi certe kuntiros per la dika liano, tiun ankaŭ, kaj tiun Ne,

malsupre tute ne estus eble savi min. Kaj supre ? Mi elsaltas en la pluvon por ke mi povu tien vidi. Jes, tie estus eble, sed brrrr ! Tie ja staras arbo kun teruraj pikiloj 30 cm. longaj, kiuj tre facile disrompiĝus en vundo. Multaj el ili staras sub ĉiu arbo. Egale ! Tion oni ne povus priatenti en danĝero pri la vivo. Ĉe la alia flanko troviĝas tro da lianoj. Tie mi povus fali antaŭ ol mi iris ekster la danĝeran zonon. Do, alie ne estas eble. Se la fulmo trafos mian arbon mi devos elsalti kaj kuri supren laŭ la vojeto maldekstren do, ŝajne renkonten al la falanta arbo meze en la pikilojn !

Tion decidinte, mi atendis tute trankvile. Tamen venis nenio. Fulmis kaj tondris ankoraŭ dum kelka tempo kaj poste ĉio finiĝis samrapide, kiel ĝi komenciĝis. Post duonhoro la suno brilis sur la foliaron, kiu tiam ŝajnis ornamita per miloj da perloj.

Mi dankis al mia ŝirmanta arbo kaj daŭrigis mian iradon. Estis iom malfacile iri sur la tiom kruda, jam tre glitiga vojo. Mi tamen estis tre proksima de la malsupra fino de la arbarvojeto. Baldaŭ mi vidos la dikan, tiel bone odorantan *Canella* (*mespilodafne sassafraz*) kiu staras ĉe la fino de la kruda parto. Strange . . . De ĉi tie mi jam devus vidi ĝin ! Post kelkaj paŝoj mi ekstaris sen-mova. Ho ! Mia Dio ! Kia bildo ! Ĝuste ĝin estis trafinta la fulmo ! Tie ĝi kuŝis kun fendita trunko. Ĝi kuntiris kun si dekstre kaj maldekstre plurajn arbojn. Baris mian vojon montego da trunkoj kaj branĉoj. Kaj mi ne kunprenis mian arbaro-tranĉilon ! Ho, la malbeninda mal-zorgo ! La arbaro-tranĉilo estas granda kiel glavo kaj por virino ne estas tre agrable iri kun glavo ĉe la

zono. Tial mi lasis ĝin hejme. Mi neniam ĝin bezonis sur ĉi tiu vojo. Sed nun ? Kion fari ? Nek dekstren nek maldekstren mi povis ĉirkaŭiri la malhelpaĵon sen tranĉilo. Ĉu reiri ? La tutan glitigan vojeton supren kaj poste la 7 km. sur la strato malsupren ? Jam nun estas malfrue. Farante tion mi ne povus reiri hodiaŭ ĉar dum la nokto en ĉi tiu arbaro la malgrandaj jaguaroj serĉas sian rabaĵon. Tamen tranokti en Caraguatatuba estas multekosta sporto ! Ne, mi almenaŭ provu trapenetri ! Antaŭen ! Mi grimpis antaŭen, grimpis malantaŭen, grimpis dekstren, maldekstren, supren, malsupren en la malseka foliaro. Belegajn orkideojn mi trovis, sed post horo de streĉa laboro mi ankoraŭ ne estis trapenetrinta la kaoson. Kiam mi fine atingis la arbarvojeton sur la alia flanko de la barilo, la suno jam staris ĉe la zenito. Mi estis laca, malpura, disŝirita kaj sangoŝmirita en pluraj lokoj. Estis bone, ke mi tiutage — kiel kutime — trairis la arbaron en laborvesto. La urbvestoj kaj la ŝuoj kunvojaĝas en la dorso-sako.

Ĉe la rivereto malsupre mi reordigis min. Nur la multaj grat- kaj tranĉ-vundoj restis.

En la poŝtoŝicejo atendis min multaj leteroj. Hodiaŭ ili estis malfacile gajnitaj !

Poste mi vizitis en Caraguatatuba konatan familion, kiu antaŭ kelka tempo donacis al mi katidon. La deksepjara filino de la familio al-rigardis min dum mi parolis kun ŝia patrino. Poste ŝi diris : “Sinjorino Erika, ĉu la katido fariĝis tiom sovaĝa ? ke ĝi tiom gratvundis vin ?”

Prof. D-ro Ivo Lapenna :

La jura signifo de la

Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj

Dum la Pariza laborperiodo de nia Internacia Somera Universitato, Prof. D-ro Lapenna prelegis en la Pariza Sorbono pri la supra temo. Ni ĵus eksciis, ke UNESKO laĉetis la prelegon kun la celo publikigi ĝin en franca kaj angla tradukoj. Tiu ĉi fakto estas plua pruvo pri la granda kultura valoro de nia ISU kaj pri la alta scienca nivelo de la prelegoj, farataj en ĝi. Okaze de la Tago de la Homaj Rajtoj (10 Decembro) ni publikigas la lastan parton de la prelego, en kiu la aŭtoro pravas la devigan karakteron de la Deklaracio.—*La redakcio.*

KIA estas la *jura signifo kaj la atingopovo* de la Universala Deklaracio?

Se oni rigardas ĝin el pure formala vidpunkto, ĝi prezentiĝas kiel *rekomendo*. La Unuiĝintaj Nacioj povas, pere de siaj organoj, fari aŭ rekomendojn aŭ decidojn. Estas sendube, ke inter la du kategorioj, nur la veraj decidoj, faritaj konforme al la Ĉarto kaj en kazoj speciale antaŭviditaj en ĝi, havas devigan karakteron. Kontraŭe, la rekomendoj havas tute apartan karakteron de deziresprimo, eble kun ioma nuanco de premo, sed ili ne povas esti konsiderataj kiel devigaj.

La ĝenerala* Asambleo akceptis la Deklaracion en la senco de la art. 13/1b de la Ĉarto, kiu antaŭvidas por tiu kazo la formon de rekomendo. Tial, el formale-jura vidpunkto, la Universala Deklaracio kiel tia estas nur simpla rekomendo, do nedeviga deziresprimo. Tiun saman opinion esprimis S-ino Roosevelt, la prezidantino de la Komisiono, parolante pri la projekto de la Deklaracio: “La projekto de la Deklaracio”—ŝi diris—“estas nek kontrakto nek internacia akordo kaj ĝi ne havos ian ajn juran devigon. Ĝi estas deklaro de principoj

pri la fundamentaj rajtoj kaj liberecoj de la homo, destinita esti aprobita per formala voĉdono de la membroj de la Asambleo.”

Se, do, oni izolas la Universalan Deklaracion kaj de la kaŭzoj, pro kiuj ĝi estis kreita, kaj de la celo, por kiu ĝi estas destinita, kaj de la cirkonstancoj, en kiuj ĝi ekestis, kaj, fine, de la tuta historia evoluo sur la kampo de homaj rajtoj kaj liberecoj, ĝia jura valoro ne estus tre granda kaj ĝiaj forto kaj atingopovo minimumaj. Eĉ en tiu okazo, kompreneble, al la Universala Deklaracio ne mankus ia jura signifo. Ankaŭ la rekomendoj, ja, havas sian juran sencon, ankaŭ ili havas ian juran valoron. Tamen, la rekomendoj ne estas devigaj kaj, sekve, la malatento de la Deklaracio ne povas esti konsiderata kiel malobeo al ordonoj de Internacia Juro, kvankam tiu malatento en ĉiu okazo signifus nekonformiĝon¹ al prema deziro, esprimita de la plej grava internacia organizaĵo.

Tute alie aspektas la problemo, se oni konsideras ĉiujn supre menciitajn elementojn, precipe se oni analizas la enhavon de la Deklaracio en kunligiteco kun la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj.

La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj plurfoje mencias—ni tion jam vidis—

* U'nu el la ĉefaj organoj de U.N., kunveno de ĉiuj ŝtatoj-membroj.

la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn. En la solena enkonduko la Ĉarto “rekonfirmas la fidon je la fundamentaj homaj rajtoj”. En la teksto mem la Ĉarto plurfoje parolas pri la “progresigo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj” aŭ pri la “efektiva respekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj”, aŭ simile. El tia formulado klare sekvas, ke la *Ĉarto rekonas la ekziston de homaj rajtoj kaj liberecoj*. Oni povas rekonfirmi la fidon je io, aŭ progresigi ion, aŭ stimuli la respekton kaj protekton de io, nur se tiu “io” fakte jam ekzistas. La Ĉarto, do, ne kreas la homajn rajtojn kaj liberecojn. Ĝi tute simple utiligas tiun koncepton kiel jam ekzistantan.

Ke la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj havas devigan karakteron, pri tio ne povas esti ia ajn dubo. Tial, *ĉiuj partoj de la Ĉarto, kiuj rilatas al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, estas ankaŭ devigaj*. Ili formas parton de la nuntempa Internacia Juro. Oni, do, povas aserti, sen ia ajn timo pri eraro, ke la *Internacia Juro rekonas la ekziston de la homaj rajtoj* kaj ke la malobservo de tiuj rajtoj devas esti konsiderata kiel rompo de ĝia regulo.

Tamen, la Ĉarto ne precizigas la homajn rajtojn. Ĝi nek difinas ilin, nek tutnombras ilin. Tion faras la Universala Deklaracio. Ĝi estas logike kaj organike ligita al la Ĉarto. La Deklaracio nur pliprecizigas tion, kio, laŭ la Ĉarto, jam estas deviga parto de Internacia Juro. Ĉar, kion oni povus kompreni sub “homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj”, se ne ĝuste tion, kion la oficialaj reprezentantoj de 48 ŝtatoj deklaris universalaj rajtoj de la homo, dum 10 aliaj reprezentantoj sin detenis de la voĉdono? Oni ne forgesu, ke eĉ ne unu sola voĉo estis esprimita kontraŭ la Deklaracio!

La juraj aktoj povas havi deklaran aŭ *konstitutivan karakteron. La unuaj nur rekonas tion, kio jam ekzistas. La aliaj estas rajtokreaĵ. La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj havas, evidente, la unuan karakteron. Tion diras ankaŭ ĝia nomo mem. La Deklaracio, do same kiel la Ĉarto, ne kreas iajn novajn rajtojn de la homo, sed ĝi nur tutnombras tiujn homajn rajtojn, kiujn oni povas konsideri kiel universale ekzistantajn. Tial *kvankam ĝi estas nur rekomendo, tamen, ĝia enhavo estas fakte deviga*. Tiu enhavo estus deviga eĉ se tute ne ekzistus la Deklaracio, ĉar jam antaŭ la Deklaracio la homaj rajtoj ekzistis; jam antaŭ la Deklaracio ili estis solene rekonitaj de la Internacia Juro pere de la Ĉarto de U.N. Nun, post la akcepto de la Universala Deklaracio, tiuj jam ekzistantaj rajtoj estas precizigitaj en jura dokumento havanta unuarangan aŭtoritaton, ĉar ĝi estas rekomendo de la plej grava internacia organizaĵo, al kiu apartenas preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de la mondo. Ne povas esti dubo, ke sub la vortoj “homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj” oni devas kompreni ĝuste la rajtojn kaj liberecojn, fiksitajn en la Deklaracio.

Ankaŭ aliaj argumentoj luktas por la deviga karaktero de la Deklaracia enhavo. La Internacia Juro havas du ĉefajn fontojn: la internaciajn konvenciojn kaj la internacian juran kutimon. Tamen, kiel parto de internacia juro devas esti konsiderataj ankaŭ la ĝeneralaj juraj principoj rekonitaj de ĉiuj civilizitaj popoloj (art. 38/1c de la Statuto de la Internacia Kortumo). La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj koncize resumas la ĝeneralajn jurajn

principojn, rekonitajn de la civilizitaj nacioj, sur la kampo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Se, sen tiaspeca Deklaracio, povus ekesti iaj duboj koncerne la demandon ĉu iu homa rajto aŭ fundamenta libereco estas fakte rekonita de la civilizitaj nacioj, nun, post la proklamo de la Deklaracio, tiaj duboj ne povas ekzisti. Kvankam nur rekomendo, *la Deklaracio estas evidenta pruvo, ke la civilizitaj nacioj rekonas la liberecojn kaj rajtojn, kiujn ĝi entenas, kiel ĝeneralajn jurajn principojn. Ankaŭ tial la enhavo de la Deklaracio estas jure deviga.* Tiu enhavo estus deviga, eĉ se la Ĉarto absolute nenion dirus pri la homaj rajtoj, eĉ se ĝi ne rekonus plurfoje ilin. En tiu okazo ĝi estus deviga kiel ĝenerala jura principo.

Fine, grava helprimedo por la konstato de la reguloj de Internacia Juro estas la Kortumaj decidoj kaj la teoriaj verkoj de la plej gravaj fakuloj (art. 38/1d de la Statuto de la Internacia Kortumo). Tio signifas, ke en okazo de dubo pri iu jura regulo, pri ĝia senco kaj atingopovo, la Kortumaj decidoj kaj la teorio estas utiligataj. Se, do, teoria verko de konata fakulo povas esti uzata kiel rimedo por konstati aŭ por korekte interpreti iun juran regulon, des pli povas esti utiligata tiel grava dokumento, kia estas la Universala Deklaracio, verko ne de unu fakulo, sed de granda nombro da oficialaj ŝtataj reprezentantoj kaj de fakuloj apartenantaj al ĉiuj juraj sistemoj de la terglobo. Ankaŭ laŭ tiu vojo, oni vidas, la enhavo de la Universala Deklaracio fariĝas deviga.

Surbaze de ĉiuj menciitaj argumentoj, mi opinias, ke la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, kvankam ĝi estas formale nur rekomendo, tamen laŭ sia

enhavo estas deviga. Sekve ĉiu atako kontraŭ la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, farita kie ajn en la mondo kaj fare de kiu ajn, devas esti konsiderata kaj estas malatento kaj malobeo al la internacia leĝo.

Alia demando estas tiu de la efektiva *internacia* protekto de la homaj rajtoj. Pluraj proponoj estis faritaj sed neniu estis akceptita. La Deklaracio mem parolas nur tre singarde pri la rajto je ribelo, se la homaj liberecoj kaj rajtoj ne estas observataj. En la enkonduko al la Deklaracio estas, nome, dirite, ke la homaj rajtoj devas esti protektataj de reĝimo de juro, “por ke la homo ne estu devigata turni sin al ribelo”. Diference de la franca Deklaracio, kiu parolas klare pri la rajto je ribelo, ĉi tie oni nur modeste mencias, ke la homo povus esti “devigata turni sin al ribelo”. Tamen estas evidente, ke en la nunaj cirkonstancoj, pro la manko de efektiva internacia protekto de ĉiuj homaj rajtoj kaj liberecoj, *la ribelo estas la ĉefa rimedo por lukti kontraŭ la tiraneco kaj subpremo.* Tiaspeca ribelo, direktita kontraŭ la piedpremantoj de la homaj rajtoj kaj liberecoj, ne povas esti konsiderata kiel kontraŭleĝa. Ĝi estas utiligata nur kiel rimedo por *restarigi la liberecon kaj justecon!* Alia potenca rimedo estas la edukado, sed ĝi havas nur moralan karakteron. Sur tiu ĉi kampo UNESKO montras konsiderindan aktivecon diskonigante, klarigante kaj popularigante la Deklaracion kun la celo respektigi ĉie la homajn rajtojn.

* * *

La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj havas grandegan ne nur moralan, sed ankaŭ juran signifon. Ĝi ankoraŭfoje rekonas la esencan egalecon de la homo kaj ĝi fiksas liajn

vidu piedon de p. 308



Oslo Vokas Vin!

Adreso : Box 942, Oslo, Norvegujo.

Bankokonto : Nen Norske Creditbank No. 6099 B/179.

Poŝtgirokonto : 153. 85.

Invito : La kongreson invitas la Urbestaro de Oslo, la Estraro de Norvega Esperantista Ligo kaj la Estraro de Klubo Esperantista en Oslo.

Programo : En la Kongresa programo troviĝas la jenaj ĉefpunktoj: Interkona Vespero, Solena Malfermo, Diservoj, Internacia Somera Universitato, Kunsidoj de la Kvar Sekcioj, Ĝenerala Kunsido, Fakkunsidoj de diversaj internaciaj organizaĵoj, Kongresa Balo, Tuttagaj Ekskursoj, Oficiala Fotografiĝo, Arta aŭ/kaj Varietea Vespero(j), Belartaj Konkursoj, Ekskursoj en kaj ĉirkaŭ Oslo, Solena Fermo k.s.

Kongresejo : estos la Universitato de Oslo, situanta en la mezo de la urbo.

Kotizoj : La bazaj kotizoj estas plialtigataj je 5 kronoj (kaj proporcie por samfamilianoj kaj junuloj) **sed ne por individuaj membroj de U.E.A. Ne**

sendu aliĝilon sen pago. Tio nur komplikas la administradon. Tial ke la banko kutime deprenas malgrandan procentaĵon pro ĝiroj el la eksterlando, estas konsilinde pagi iom pli. Eventualan kromaĵon oni enskribos je kredito de la kongresano kaj repagos en la kasgiĉeto en la momento de alveno en la kongresejo.

Unua Bulteno kaj Aliĝiloj estas jam disponeblaj kaj estos sendataj kontraŭ peto.

Solena Malfermo okazos en la Urbodomo, Oslo.

Interkona Vespero okazos en la Intenigrenes hus, Oslo.

Fakasocioj kiel eble plej baldaŭ anoncu siajn dezirojn pri salonoj, tago kaj horoj de kunsidoj.

Statistiko : Aliĝis ĝis fino de oktobro 130 personoj el 19 landoj.

Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario.

daŭrigo (de p. 307)

rajtojn en ĉiuj anguloj de la terglobo, tute egale al kiu raso, nacio, religio, lingvo aŭ sekso li apartenas. Ĝi estas simbolo de la tuthomeco kaj de la universaleco de la mondo, kiu estas propraĵo de la homo, super ĉiuj landlimoj, haŭtkoloroj, flagoj kaj konvinkoj. La Universala Deklaracio estas esperiga standardo, sub kiu

kolektiĝas milionaj amasoj kaj ĉiuj vere intelektaj elitoj, konsiderantaj la homon unue kaj antaŭ ĉio homo, kaj dezirantaj plene realigi mondon de libereco, egaleco, justeco; mondon, en kiu la feliĉo de la tuto baziĝos sur la feliĉo de unuopuloj kaj tiu de la unuopulo sekvos el la feliĉo de la tuto.

Hans Jakob 60-jarulo

EN dimanĉa vespero en novembro, taŭga por meditado kaj trankvila studado, mi staris antaŭ miaj librobretoj kun Esperanto-libroj. Mi rigardis la librojn kun leteroj de Zamenhof, diversajn antologiojn kaj haltis ĉe la Enciklopedio, kiun mi dum tuta jaro ne estis tuŝinta. Mi prenis tiun libron, iom trafolumis ĝin kaj subite haltis ĉe la nomo Hans Jakob. Frapas min la naskiĝdato, 15 dec. 1891. Nia ŝatata redaktoro kaj estrarano de U.E.A. Hans Jakob do en tiu ĉi jaro festos sian 60-jaran jubileon !

Tiu jubileo nepre devas esti akcentata, ĉar nia redaktoro ludis vere gravan rolon en nia movado.

Sed ĉar mi malfrue liveras la manuskripton al la presejo (Tiun ĉi artikolon mi kaŝe enmetas, do sen permeso de la redaktoro !), mi nur tre resume prezentos la unikan laboron, kiun faris en nia movado Hans Jakob.

Jam en la jaro 1912 li komencis sian deĵoron en la Centra Oficejo de U.E.A. en Geneve. Dum preskaŭ 40 jaroj li do ludis gvidan rolon. Li estis administranto kaj redaktoro de nia

revuo kaj verkis por ĝi sennombrajn, valorajn artikolojn. Dum 25 jaroj li estis direktoro. Post la kunfandiĝo inter U.E.A. kaj I.E.L. li fariĝis estrarano kaj redaktoro.

Li partoprenis preskaŭ ĉiujn universalajn kongresojn kaj akiris neordinare vastan konon pri la movado. Li kolektis de jaro al jaro faktojn pri ĉio, kio koncernas Esperanton rilate al literaturo, oficialaj rekonoj, statistiko, biografio k.t.p. Mi ofte konsideris lin pli fidinda ol enciklopedio !

Persone Hans Jakob estas afabla personeco, kaj pri lia bonkoreco atestas lia sinofera agado por milit-suferantoj dum kaj post la du mondmilitoj. Kiam li solenas sian naskiĝtagon, al li direktiĝas korvarmaj sentoj kaj bondeziroj de la kolegoj en la estraro kaj komitato de U.E.A. kiel ankaŭ de multnombraj esperantistoj el tuta Esperantujo !

E. Malmgren.

Noto : Lastatempe li estis nomita kandidato de la Socialdemokrata Partio por la Svisa Parlamento kaj same por la Kantona Parlamento Ĝeneva.

Esperantista Vivo

Geedziĝoj

Herbert-Rapley. F-ino Elsa Herbert kaj S-ro John Rapley en Londono, Anglujo, je 20 oktobro 1951.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Backheuser, Prof. inĝ. Everardo, en Rio de Janeiro, Brazilo je 10 oktobro 1951, 72-jara. Esperantisto de 1906, kunfondinto, unua prezidanto kaj honora prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo kaj Brazila Klubo Esperanto.

Ducommun, Edouard, je 8 oktobro 1951, 87-jara en Les Brenets, Svislando, honora membro de S.E.S. kaj fidela amiko de U.E.A. Esperantisto jam de 1899, unu el la unuaj pioniroj de nia movado, same kiel Edmond Privat kaj Hektor Hodler, tiam redaktoroj de *Juna Esperantisto*.

Ellström, Gustaf, D. de U.E.A. en Surte, Svedlando, je 21 oktobro 1951, 56-jara, per aŭtobusa akcidento.

Hepton, A. E., en Cottingham, Anglujo, je 17 februaro, 74-jara. Honora Membro de U.E.A. kaj malnova Esperantisto.

Kennedy, Rankin, en Glasgow, Skotlando, je 10 oktobro.

Enigma Konkurso N-ro 63

Solvojn sendu al S-ro P. H. Mooy, rue Stuyvenbergh 28, Brussel II, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 61.

N-ro 133. Sia estas pli kara ol la najbara (N-ro 347): pasamento, reciproka, perlamoto, riverenco, rojalismo, sfinktero, alabastro, apostrofo, rekomendi, dekametro, ekstrakto, dekoracio, antisepso, marmelado, pastinako, horoskopo, poligloto, diplomato, toreadoro, metronomo, vertikala, okdekjara, terebinto, medaliono tarantulo, strategio.

N-ro 134. Ĉar la ŝoforo foriris je la kutima horo kaj alvenis kvaronhoron pli frue ol kutime, li veturis 15 min. malpli ol kutime kaj renkontis S-ron X. 7.5 min. antaŭ la 6-a. S-ro X. mem do promenis 1 horon kaj 52.5 min. aŭ 15-oble 7.5 min. La rapideco de la ŝoforo do estis la 15-oblo de tiu de S-ro X. aŭ po 75 Km. en horo.

N-ro 135. Li loĝas tie, kien eĉ birdo ne flugas. Pecon detranĉitan al la pano ne regluu. Komenciĝis proceso, mono fluas sen ĉeso. De la buŝo ĝis la manoj estas granda interspaco. Kalumniante konstante oni eĉ anĝelon nigrigas.

Enigmo N-ro 138. 1. listo; 2. rismo; 3. etiko; 4. kanti; 5. oro; 6. naso; 7. akso; 8. gramo; 9. etiko; 10. vato; 11. greno; 12. mono; 13. mento; 14. trakti; 15. mano; 15. metro; 17. tono; 18. noto; 19. kuri; 20. kulero; 21. ingo; 22. felo; 23. rito; 24. zono;

Antaŭ ĉiun el la ĉi supraj vortoj metu tri literojn, tiel ke vi formas novajn vortojn, kies triaj literoj formas proverbon. Tiuj literoj estas: a a a b d e e f i i n n o o p r r s s t t t.

Enigmo N-ro 139. La tuto konsistas el 47 literoj kaj formas esprimon el la Proverbaro de D-ro Zamenhof. 38 - 26 - 19 - 45 - 10 - 32 - 15 - 23 - 40 - 7

amerika violenigra ligno. 5 - 43 - 16 - 44 - 3 - 25 - 1 - 18 - 37 - 12 unu el la zodiakaj stelaroj. 34 - 8 - 42 - 13 - 39 - 18 - 31 - 9 - 30 - 20 ĝenerala. 28 - 9 - 2 - 33 - 22 - 41 - 29 - 40 - 14 adamo ne uzis tion. 35 - 4 - 21 - 6 - 47 - 27 - 24 bonodora floro (kruciferoj). 11 - 20 - 19 - 46 - 32 - 25 - 17 - 2 - 36 tapeto super trono.

Enigmo N-ro 140. Dividu ĉiun el la ĉi-subaj vortoj en du egalajn partojn kaj metu 3 literojn inter tiujn du partojn, tiel ke ekestas vortoj laŭ la sekvantaj klarigoj. La mezaj literoj de la novaj vortoj tiam formas esprimon el la Proverbaro de D-ro Zamenhof. Jen la vortoj: 1. koni; 2. selo; 3. veno; 4. kulo; 5. taro; 6. viro; 7. mammo; 8. foto; 9. vino; 10. luno; 11. tuto; 12. bato; 13. taso; 14. tuso; 15. tino; 16. rodo; 17. mato; 18. digo; 19. ekio; 20. silo; 21. milo; 22. kubo; 23. malo; 24. doti; 25. koto; 26. arto; 27. sume; 28. bati; 29. maro.

La klarigoj estas: 1. lerte aranĝi; 2. palaco; 3. bonodora vegetaĵo; 4. dentskrupulo; 5. metiisto; 6. acidaĵo; 7. sentenco; 8. dimensio; 9. blankflora vegetaĵo; 10. medikago; 11. tio estas matene farata; 12. superfluaĵo; 13. konifero; 14. juvelŝtono; 15. spicaĵo; 16. konstruaĵo; 17. eminenta nobelo; 18. interparolado; 19. matematika egalaĵo; 20. avertigilo; 21. mambesteto; 22. mezurunuo de elektra kvanto; 23. korpoparto; 24. superŝuti per favoroj; 25. manĝaĵo; 26. metalo; 27. belege; 28. lukti; 29. titolo.

Agrablajn festotagojn kaj prosperan 1952 mi deziras al ĉiuj solvantoj.

P. H. Mooy.

F. Omelka

Nia felietono :

La Alaska Stafeto

“Hura ! Bonega ideo !”

La knaboj faris rondon kaj jam ili kuris.

“Sed tio estas nenio—kuradi tiel en la rondo,” malplaĉis la afero al malgranda Eskimo.

“Kiel vi tion volus ?”

“Ni faru tion kiel maturaj homoj, unu post la alia !”

“Sed kien ni kuros ?”

“Eble en la urbon kaj poste denove reen.”

La nova propono plaĉis al ĉiuj. Ili tuj ekokupis siajn lokojn. La unua stariĝis Georgo kaj tiuj sekvantaj ĉiam post tricent metroj. La lasta estis la malgranda Eskimo. Li staris kelkajn metrojn antaŭ la unua domo de Nome.

Kiam ĉiuj estis sur siaj lokoj, la Eskimo levis poŝtukon kiel signon, ke li estas preta. Apenaŭ tion ekvidis la knabo, kiu staris antaŭ li, kiam li levis la sian. Tiamaniere progresis la signo ĝis Georgo.

En la momento, kiam Georgo volis ekkuri, li ekaŭdis strangan tumulton. Li rigardis al la maro kaj ne kredis al siaj okuloj. Ĉiuj grupoj reveturis. Kaj ili ne estis solaj ! Inter ili estis Gunnard Kasson !

Georgo pro ekscitiĝo forgesis svingi per sia poŝtuko kaj ekkuris al la urbo.

“Gunnard Kasson !” li kriis el la tuta gorĝo al la plej proksima knabo.

“Kio estas ?”

“Gunnard Kasson !”

La knabo ekkomprenis.

Li saltetis sur sia loko, kvazaŭ apud li iu pafegis. Kaj jam li kuregis pluen . . .

Kaj tiel okazis, ke la sciigo pri la alveturanta Kasson atingis la urbon dum kelkaj minutoj.

La lasta knabo kuris tra la stratetoj de la urbo kaj kriis la konatan, milfoje elparolitan nomon.

Homoj forlasis siajn hejmojn kaj konfuzite ĉirkaŭrigardis. Ankaŭ la telegrafisto elkuris el sia oficejo. Kiam li ekaŭdis la krion de la knabo, li ekhavis ideon, ĉu tio eble estas nur ŝerco. Ĝi estus ja iom barbara kaj kruela ŝerco, sed ! Sed malgraŭ tio li estis venkita per la ĝenerala ekscitiĝo kaj kun multaj aliaj kuris al la maro.

Li apenaŭ forlasis la urbon, kiam li ekvidis alveturi longan vicon de viroj. El iliaj brilantaj vizaĝoj li facile legis la ĝojegan kaj tiom longe atenditan sciigon.

Kvankam scivolemo pelis lin renkonten al la veturantoj, li tamen venkis ĝin kaj rapidis al sia oficejo. Kaj post kelkaj momentoj, li sidis ĉe sia aparato kaj per tremanta mano li elfrapis la finan raporton :

“Nome, la 2-an de februaro 1925. *La stafeto alvenis !*”

Apenaŭ li faris tion, li denove kuris eksteren . . .

Doktoro Welch estis tiam ĉe la tagmanĝo. Sed eĉ hejme li ne estis trankvila. Li pensis pri la malsanuloj, kaj precipe pri Kasson. Ĉu li alvenos ?

Ĉiumomente li iris de la tablo al la fenestro. Li devus jam esti ĉi tie . . .

Kaj tamen, kiam li ekaŭdis la liberigan ekkriion, li restis kiel frostigita. Li paliĝis, liaj kruroj ŝtoniĝas kaj li ne povis moviĝi de la loko.

“Silvio, ĉu vi aŭdis?” li flustris kaj lia voĉo tremis pro ekscito.

“Dank’ al Dio! Do—tamen . . . !”

Kaj ankaŭ ŝia emocio, kiun ŝi kaŝis en si tiom da tagoj kaj noktoj, esprimiĝis per varmegaj larmoj.

Doktoro Welch rapide venkis la fortan impreson, ĵetis sur sin surtuton kaj rapidis eksteren.

Li alkuris inter ĝojkriantan aron da homoj en ĝusta tempo, por ke li povu bonvenigi la lastan anon de la stafeto.

Li ĉirkaŭbrakis la malbonege aspektantan Kasson kaj kisis lin. En tiu momento ĉiuj okuloj malsekiĝis.

Kaj en tiu ĉi solena momento ekparolis la ŝerifo. Per simplaj, sed koraj vortoj li dankis al Kasson pro la senekzempla sinoferemo. Kaj kiam Kasson rifuzis la dankon, menciante la aliajn partoprenantojn de la stafeto, la ŝerifo daŭrigis:

“Jes, vi ĉiuj havas egalajn meritojn, mi scias. Kaj per tio ĉi mi dankas al ĉiuj herooj, kiuj batalis por savi nian urbon. Via heroeco eterne vivos en la koroj de ni ĉiuj kaj en la memoro de tiuj, kiuj venos post ni. Mi dankas vin.”

La homoj ariĝis ĉirkaŭ Kasson.

Pasis longa tempo antaŭ ol ili komencis disiri. Ili ne povis kredi al la miraklo, kiu fariĝis fakto.

Ili estas savitaj!

Dume doktoro Welch rapidis kun paketo da sero en sian kabineton. Post kelkaj momentoj li komencos ĉirkaŭviziti siajn malsanulojn. Hodiaŭ li veturos longe, longe tra la nokto . . .

Kaj ĉien, kien li enpaŝos, li kunportos la helecon de la suno.

Li kunportos la vivon.

XI. Fino

PASIS unu jaro.

Kaj denove fajfis malvarma norda vento de la poluso.

Loĝantoj de la urbo Nome sidis en la varmigita salono de la hotelo kaj atendis komencon de la infana teatraĵo.

“Do, la infanoj tamen ĝisatendis la aferon!” diris Davison.

“Espereble ĝi ne estos denove tiel malfeliĉe prokrastata, kiel pasintjare!” diris kun ekĝemo sinjorino Hastings. “Kredu al mi, mi ne volas eĉ rememortion.”

“Ni ĉiuj suferis sufiĉe,” kapjesis Davison. “Sed via situacio estis tamen la plej malbona, sinjoro doktoro!” li turnis sin al doktoro Welch.

“Nu, tio estas jam for . . .”

“Sed kiam venis la sero, la morto versimile tre ekkoleris kontraŭ ni,” ŝercis la ŝerifo. “Ja jam de tiu momento kiel en fabelo: fino de la mortado, fino de plua disvastiĝado de la difterio.”

“La tuta malfeliĉo alportis tamen ankaŭ ion bonan,” diris maljuna sinjoro.

“Ion bonan? Kiel do?” Ili ne komprenis kaj demande rigardis la homon, kiu diris tiom strangajn vortojn.

“Ĉu vi ne rimarkis, kiel la malfeliĉo kunigis nin ĉiujn? Kiel ni estas de tiu tempo iel aliformigitaj?”

“Nu, tio estas vero. Dum la tuta jaro ĉi tie ne estis eĉ unu konflikto. La advokato ĉi tie baldaŭ mortos pro malsato.”

“Mi opinias, ke krom la malsano, kunigiĝis nin ankoraŭ io alia,” diris enpense Davison.

“Kio?”

“La stafeto.”

“Ho, la stafeto . . . ! Eĉ hodiaŭ homo preskaŭ ĉesas spiri pripensante la heroecon de tiuj kuraĝuloj !”

“Mi bedaŭras nur tion, ke krom Kasson ni vidis neniun el ili. Rigardu, la afero estas vere stranga: kelkaj viroj batalegas, ili riskas sian vivon—kaj ni neniam eĉ ekscios, kiel ili aspektas.”

“Ni povus inviti ilin al Nome, sed, imagu, tia malproksimeco !”

En tiu momento oni sonorigis la trian fojon kaj la prezento komenciĝis.

Infanoj prezentis la teatraĵon, kiun ili konis jam antaŭ unu jaro. Kiam la epidemio estis forpelita, apenaŭ restis sufiĉe da tempo nur por la ekzamenoj, tial ili prokrastis ĉion ĝis la vintro. Ĉiu akto estis rekompencita per meritita aplaŭdo.

Kiam la teatraĵo estis finita, la ŝerifo stariĝis antaŭ la publiko kaj diris:

“Karaj amikoj, restu ankoraŭ momenton sur viaj lokoj. Mi havas por vi malgrandan surprizon.”

Ĉiuj denove sidiĝis kaj scivoleme rigardis al la scenejo. La ŝerifo mansignis al la knaboj, por ke ili montru ekranan tolĉon. Projekciisto foriris en sian kabaneton.

La scivolemo de la vizitantoj kreskis duoble.

La aparato ekzumis, lampoj estingiĝis. Kaj sur la blanka tolo aperis la surskribo: *La Alaska stafeto*.

En la salono ekmuĝis, sed denove trankviliĝis.

Aperis stacidomo en Nenana. Tuj poste Will Shannon kun siaj hundoj.

En tiu momento kvazaŭ iu donis signon, la vizitantoj stariĝis sur siaj lokoj, aplaŭdis, ĝojkriis, premis reciproke la manojn, larmis.

Kaj jam defilis la ceteraj herooj: Wurd Kalland, Emil Erikson, Leonard Seppala, Gunnard Kasson. Ĉiu kun sia kunjungaĵo. Gunnard Kasson kun kvin hundoj.

La salono subite pleniĝis per brilo de blindiga lumo.

Kaj kun tiu ĉi lumo en la animoj disiris la Nomanoj en siajn hejmojn . . .

Fino



ESPERANTO KAJ RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Dimanĉo	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	07.15–07.30	Stockholm. 19.80m., 49.46m. P.
	15.15–15.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	22.15–22.40	Hilversum, 298m. kaj 188m. I.M. (ĉiun duan lundon): V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	00.45–01.00	Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo.
	01.15–01.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94, rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	22.15–22.30	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América, Guatemala Cd., C. Ameriko.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	17.30–17.50	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 445m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.10–17.25	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
	17.35–17.40	Bern. Kiel lunde. P. D-ro Privat.
Vendredo	17.30–17.50	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur la unuan vendredon de ĉiu monato). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
	22.30–23.00	Hilversum. Kiel lunde. M.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Noto : Ĉiun duan lundon kaj ĉiun vendredon la stacio VARA en Hilversum anoncas gramofonmuzikan programon en Esperanto. Estas dezirinde, ke aŭskultantoj esprimu al la stacio siajn dankon kaj deziron aŭdi iun muzikaĵon.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 243

2-an de Novembro 1951

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 31a de Oktobro, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1950 :

	1950	1951
Asociaj membroj	8305	7620
Individuaj membroj :		
MJ	872	881
MA	4239	4520
MS	288	277
Patronoj ..	15	16
DM	207	245
HM	59	59
	5680	5998
	13985	13618

DELEGITOJ

Britujo

Lochgelly (Fife, Skotlando). D : W. White, 4 Zetland Place.

Ovingdean. D : vakas pro morto.

Swindon (Wilts.) D : R. England, 48 Kent Road

Ventnor (I.o.W.) D : S-ino A. J. Saunders, Sydney Lodge, Bath Road. Tel : 722.

Wedmore. D : vakas.

Danujo

Kolding. FD (Turismo) : Benny Nielsen, Vejlevej 49. Tel : 2910.

Vejle. D : Arthur Jensen, Grønnegade 20.

Francujo

Grasse (A.M.) D : S-ino P. Bariteaud, Sainte-Brigitte.

Toulouse. D : A. Albault, 6 Rue de Douaumont.

Germanujo

Stuttgart. D : vakas.

Kanariaj Insuloj

Santa Cruz de Tenerife. D : A. Llinàs Bellvehi, Jefatura de Obras Públicas.

Italujo

Cremona. FD (Kudromaŝinoj) : L. Topi, Corso Garibaldi 64. Tel : 16-78.

Lucca. D : Prof. D-ro G. Campetti, Via A. Mordini 62. Tel : 53-28.
FD (Ekonomio) : La D.

Koreujo

Taegu. D : Heng Wi Hong, Chunggu University, 26 Pozyungdong. Tel: 2241.

Norvegujo

Oslo. FD (Studentaj aferoj) : vakas.

Sarpsborg. D : J. H. Rosbach, St. Mariegate 157.

FD (Lingvoj) : La D.

Pollando

Klodzko (Dolny Slask). D : S-ino H. Denenfeld, ul. Holdu Pruskiego 11.

Svedujo

Halmstad. D : vakas pro morto.

Svislando

Ascona. D : S-ino L. Marthaler, "La Dometo". Rel : 7.5126.

La Neuveville. D : J. Gilliard, Collège 144. Tel : (038) 79227.

Thun. D : F. Schwarz, Wiesenstrasse 1, "Wieseck". Tel : (033) 2.46.25.

Uzwil (St. Gallen). D : S-ino I. Mittelholzer, Lindenplatz.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Walder, S-ro O., Romanshorn, Svislando

Schaltegger, S-ro J., Aarwangen, Svislando

Robertson, S-ro J., Zürich, Svislando

Du Pasquier, Prof. L. G., Neuchâtel, Svislando

Gray, F-ino M., Bournemouth, Anglujo

Pilloy, S-ro M., Ottignies, Belgujo

Matthey, S-ro W., Biel, Svislando

Streun, S-ro W., Bern, Svislando

Tompkins, F-ino S., Rickmansworth, Anglujo

Midas, S-ro F. C., London, Anglujo

Ahlm, S-ro S. W., Stockholm, Svedujo

PATRONOJ 1952

1. Williams, D-ro F. J., Melbourne, Aŭstralio

2. Wooding, S-ro N., Leicester, Anglujo

3. van der Lijn, S-ro G., Uccle, Belgujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1952

1. Pfanner, S-ro J. R., Ganderhun, Sieraleono

2. Roome, S-ro G. W., Sheffield, Anglujo

3. Broadway, S-ro B. J., Bournemouth, Anglujo

4. Langham, S-ro W., Iver, Anglujo

5. Marshall, Dr-ino J., Dumbarton, Skotlando

6. Bluett, S-ro T. L. C., Truro, Anglujo
7. Langman, S-ro D. J., Birmingham, Anglujo
8. Miller, S-ro J. R., Stone, Anglujo
9. Shaw, S-ro F. W., Whitworth, Anglujo
10. White, S-ino F. W., Bournemouth, Anglujo
11. Yates, S-ro H., Radcliffe, Anglujo
12. Couvreur, S-ino M., Bruxelles, Belgujo
13. Magotteaux, S-ro L., Liège, Belgujo
14. Staes, S-ino F., Bruxelles, Belgujo
15. Aproso, S-ro E., Torino, Italujo
16. Bohren, Prof. A., Thun, Svislando
17. H. Hattemer, S-ro H., Solothurn, Svislando
18. Jost, S-ro K., Zürich, Svislando
19. Monod, F-ino H., Morges, Svislando
20. Christensen, S-ro Nils, Hamar, Norvegujo
21. Haugen, S-ro S. L., Kongsberg, Norvegujo

DONACOJ. H. Davies 100ŝ., S. Malek 2ŝ., F-ino V. C. Nixon 5ŝ., F. A. Scarborough 2ŝ. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

JARLIBRO 1951, dua parto, eliris en la fino de Oktobro. Se iu membro ne ricevis ĝin li informu la centran oficejon.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Nur 150

binditaj volumoj de

ESPERANTO, 1951

estas aĉetebraj.

Ili estos binditaj en verda tolo kun indekso, kaj estos pretaj en la fino de januaro 1952.

316 paĝoj kun multaj ilustraĵoj.

Kiu unue mendos, tiu ricevos.

por MA 1951 de UEA :

5ŝ. 6p. aŭ frankite

por aliaj : 10ŝ. 6p. aŭ frankite

Mendu ĉe

Universala Esperanto-Asocio

Heronsgate,

Rickmansworth (Herts.), Anglujo

En Stokholmo

Laŭ deziro kiun la Estraro esprimis dum la kongreso en München, mi vizitis la Prezidanton en Stockholm. La celo estis preparoli diversajn gravajn aferojn, rilate al la Esperanto-Movado kaj al nia U.E.A.

Kun ĝojo mi konstatis ke la Prezidanto Malmgren tute resaniĝis, kaj jam dediĉis multe da tempo kaj da atento al la gvidado de nia Asocio. Dum pli ol du tagoj ni kune pristudis, unu post la alia, multajn diversajn punktojn, kaj ĉiam atingis konkretajn rezultojn. Mi kore dankas nian Prezidanton Malmgren pro lia amika akcepto kaj dediĉas specialan rememoron al la ĉarma S-ino Malmgren, kiu plurfoje akceptis min en la hejmo. Al la svedaj samideanoj mi ankaŭ volas esprimi mian dankon pro la lerta maniero laŭ kiu ili aranĝis mian restadon kaj uzis ĝin por bona propagando.

Alveninte merkredon posttagmeze, mi faris vespere paroladon en Grupo Esperantista de Stockholm pri "Esperanto en la Scienco". Jaŭdon mi estis intervjuita—kaj fotografita!—de la reprezentantoj de la plej gravaj gazetoj de la urbo, kiuj poste favore raportis. La intervjuon aranĝis nia malnova kaj fidela samideano Nylén en la ĵurnalista klubo. Vendredon mi dum 15 minutoj interparolis kun la Prezidanto Malmgren antaŭ la mikrofono por mallongonda dissendo.

Mi konservas de tiu mallonga restado en Svedujo, plej bonan impreson pri la sveda movado kaj pri ĝiaj gvidantoj, kiuj uzas ĉiujn rimedojn pri kiuj ili disponas por montri al la publiko ke Esperanto estas serioza afero, inda meriti la atenton de ĉiu persono kiu interesiĝas pri la homa estonto.

*D-ro P. Kempeneers,
Vic-prezidanto de U.E.A.*

ANONCETOJ

Kosto : du pecoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kaj la anĝelo diris al ili : Ne timu ; ĉar jen mi venigas al vi bonan sciigon de granda ĝojo, kiu estos al la tuta popolo. S-ta Luko 2. 10.

Somero 1952. Geedzoj aŭ du amikinoj kiuj deziras someran libertempon ĉe farmbieno "au pair" skribu al S-ro Hickson, Cauldron Barn Farm, Swanage, Anglujo.

AAAAAAAAlt. Legu Jarlibron pĝ. 55.

Mi deziras aĉeti la 1-an volumon de la *Fabeloj de Andersen* en bona stato. Proponojn faru al S-ro Augustin J. Palacios, E.S. Zeballos 20, Rosario, Argentino. Mi respondos al ĉiu proponinto.

Sendu 2 respondkuponojn, vi ricevos 50 francajn poŝtmarkojn (malsamajn, uzitajn, nedifektitajn). Nepre respondos. Skribu al S-ro Robert Collet, 1 rue du Filoir, Etampes (S.O.), Francujo.

Lingva gvidilo "Esperanto" (Esperanto-germane) de la Polyglott-eldonejo en Bonn reeldoniĝis. Kontraŭ kvin int. respondkuponoj vi ricevos ĝin de Ernst Kind, Delegito de UEA, Kirschallee 5/II, Bonn, Germanujo.

Teknikisto deziras korespondi pri mekanikaj aferoj. Felice Bertoletti, Via Pestalozzi 4, Milano, Italujo.

Por 5 respondkuponoj mi sendos belajn pm. de Germanujo. Ambaŭflanke filatela afranko. Karlo Schmauder, Im Hag 6, Stuttgart-Untertürkheim, Germanujo.

Internacia Bonhumoro. Kontraŭ 1 angla ŝilingo, 2 poŝtrespondkuponoj, aŭ egalvaluto vi ricevos provnumeron de la nova, riĉe ilustrita esperantlingva revuo. IB., Strindbergsvej 36, København, Danlando.

Kelkaj seminariaj lernantoj deziras korespondi kaj interŝanĝi P.I. kun malproksimaj gesamideanoj. Adreso : Esperanto-grupo Seminaari, KAJAANI, Finnlando.

Korespondi per P.I. deziras kelkaj fraŭlinoj kaj sinjorinoj. Unuan fojon adresu al S-ro Svant Luukko, OUTOKUMPU, Finnlando.

Kiu scias la hodiaŭan adreson de la ĉirkaŭ 30-jara David Rossican, naskita en Vilno ? Skribu al Isja Rossican, De Genestetlaan 30, Hilversum, Nederlando.

Letervespero por 20 gelernantoj, 16-40 jaraj, okazos fine de januaro 1952. Bonvolu skribi—respondo estas garantiata—al S-ro

Ernst Ostertag, Hopferstr. 5, KAUFBEUREN, Bayern, Germanujo.

XV Olimpiado en Helsinki. Kiu volas ricevi la poŝtmarkojn de Olimpiado 1952 filatele stampitajn sur koverto, sendu 6 internaciajn resp. kup. per adreso Tauno Kostiainen, RUOLAHTI, Finnlando. Skribu adreson preslitere.

70 gelernantoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Certe respondos. Esperanta Fako de Lingua Club, MANRESA (Barcelona), Hispanujo.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun junuloj el la tuta mondo ; respondos certe : S-ro Svante Gustavsson, Slingvägen 8, Skövde, Svedujo.

Angla "Linguaphone" kurso de Esperanto. Mi aĉetis tian kurson nova (15 duoblajn gramofondiskojn en perfekta stato) sed ne povas utiligi ĝin pri tio ke la helpa teksto estas anglalingva. Mi vendas ĝin nur 10 pundojn. Bonvolu turni vin al Redaktoro Einar Norin, K.F.-s Bokförlag, Stockholm 15, Svedlando.

Studanto deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Adreso : Renato Zuccolo, Rua Tupi 623, São Paulo, Capital, Brazilo.

Esperantujo. Poŝtkartvespero okazos je la fino de Aprilo 1952. Sendu al S-ro S. Tompkins, 24 Park way, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Helpu entuziasmigi nian popolon per nia letervespero je la 29a de Januaro 1952. Esperanto-Grupo, Simon-Haune-Str. 8, Bad Hersfeld, Germanujo. Respondo garantiata.

"BAILEY"-PONTO

Ni deziras ĉiuspecajn erojn de la Ponto "Bailey" (alianca militmaterialo), iukvante. Bonvole ofertu plendetale, indikante prezojn kaj situon, al

CATHAY OVERSEAS Ltd.

Cathay House, Beaufort Gardens,

London, S.W.3, Anglujo

KION VI SCIAS PRI LA FRUAJ TAGOJ?

Jen kelkaj helpaj libroj

VIVO DE ZAMENHOF

Edmond Privat

Bele bindita, ilustrita, 5 ŝil., aŭfranko 5p.

La libro, kiun ĉiu Esperantisto devus posedi

* * *

LETEROJ de L. L. ZAMENHOF

Prezentado kaj komentado de Prof. G. Waringhien

1-a volumo, 1901–1906, 388 paĝoj

2-a volumo, 1907–1914, 374 paĝoj

Ĉiu volumo po 21ŝ. 6p., aŭfr. 9p.

* * *

ORIGINALA VERKARO

Kompilis J. Dietterle

Preskaŭ ĉio, kion verkis originale D-ro Zamenhof

606 paĝoj. Bele bindita.

Prezo : 25ŝ. 6p., aŭfranko 9p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

